# TELOPEO

La Oficiala Gazeto de la Esperanta Federacio de Novsudkimrio

Telopeo Volumo 57 Numero 03
Merkrede je la dek-sesa de junio 2021
Esperanto House 143 Lawson Street REDFERN NSW 2016 AUSTRALIA
Redaktoro: Maria TERANO, Provleganto: Kaja MORANTE

---

## Enhavo

**Telopeo** 1

1 Daniel KANE 3

2 Newington College Vizitis Esperanto-Domon 4

3 Komuna Voĉo 5

4 Sep Metodoj Por Ludi Pli Bonan Ŝakon 7

4.1 Konkludo 7

5 Utilismo — Kion oni devus fari? 8

6 Matematikisto Pensas Pri Dio 11

Aksiomo 1: Mi ekzistas 12

Aksiomo 2: La ekstera mondo ekzistas 12

Aksiomo 3: Vi ekzistas 13

Aksiomo 4: Memoro estas kontinua 13

Aksiomo 5: Logiko validas 13

Aksiomo 6: Estas io preter la materia universo . . . . . . . 14
Aksiomo 7: Ni ĉiuj havas liberan volon . . . . . . . . . . . 14
Aksiomo 8: Dio ekzistas . . . . . . . . . . . . . . . . . . 15
Aksiomo 9: Kristanismo provizas fidindan kadron . . . . . 16

**EFNSK** **18**

# Daniel KANE

*Nicole ELSE, sekretario de EFNSK*

Kun grandega malĝojo mi eksciis pri la forpaso de Daniel KANE la 16an de aprilo. Li lernis Esperanton kiel junulo kaj fariĝis tre lerta Esperantisto. Li estis profesoro pri la ĉina lingvo en la Sidneja universitato: Macquarie University. Antaŭe li laboris dum iom da tempo en la aŭstralia ambasadejo en Pekino. Unufoje en 2006 li ankaŭ instruis altnivelan kurson en Esperanto pri Esperanto kadre de la sidneja universitato: University of New South Wales. Mi estis unu el liaj lernantoj.

Daniel KANE ne nur estis tre sperta persono, sed ankaŭ ĉiam afabla, ĉiam bonkora. En 2014 mi intervjuis Daniel KANE kaj li interalie rakontas pri siaj spertoj pri tiu oficiala universitata altnivela Esperanto instruado, kaj ke instrui tiun kurson ne estis ĉiam tute facila tasko por li. Spektu mian filmeton en jutubo. La intervjuo kun Daniel komenciĝas 5 minutojn post la komenco kaj daŭras 6 minutojn.



# Newington College Vizitis Esperanto-Domon

*Jonathan COOPER, kasisto de EFNSK*

Merkrede je la tridek-unua de marto 2021 dek lernantoj de Newington College, kaj sia instruisto, renkontis min ĉe Esperanto-Domo por du-hora ekskurso. Tiuj estis la samaj lernantoj, kiuj lernas Esperanton per Duolingo kaj al kies klaso mi prelegis pri Esperanton merkrede je la tria de marto 2021.

Ŝajnis al mi, ke la ekskurso estis sukcesa. Post kiam mi montris al ili la ĉefan konstruaĵon, gastĉambron, bibliotekon kaj arkivon (inkluzive de poŝtkarto de D-ro Zamenhof), mi gvidis lecionon pri diversaj lingvaj temoj.

Estis malfacile taksi iliajn scipovojn de la lingvo — ne surprize, iuj havis pli da lerteco ol aliaj.

Mi aranĝis konversacion/intervjuon per Zoom kun la indonezia esperantisto Ilia DEWI, por montri la «realmondan» utilecon de Esperanto, sed bedaŭrinde, je la tempo ŝi estis tre okupata ĉe sia laborejo kaj tute forgesis. Malgraŭ tio, ŝajnis, ke la lernantoj ĝuis sian viziton, kaj ili faris multajn bonajn demandojn (en la angla).

Antaŭ ol la grupo foriris, la instruisto esprimis intereson organizi alian eventon, eble per Zoom.




Figuro 1: Foto farita de Dmitry LUŜNIKOV

# Hej Google, aŭtomataj subtekstoj ĉe Jutubo, Zoom, kaj prononcekzercoj ĉe Duolingo, baldaŭ en Esperanto

*Kaja MORANTE, membro de EFNSK*

Ekde kelkaj jaroj, la ĉefaj dialektoj de la grandaj lingvoj, kiel la angla kaj hispana, havas funkcieblajn voĉrekonilojn. Pere de maŝinlingva lernado, kun granda kolekto de kelksekundaj voĉregistraĵoj kaj ties tekstoj, eblas evoluigi softvaron kiu plenumos la taskojn en la titolo de tiu-ĉi artikolo.

Imagu voĉkomandi vian telefonon per Esperanto. Aŭ ĉeesti Zum-konferencon kaj senpene kompreni ĉiujn. Imagu la eblecon ekzerci vian prononcadon ĉe Duolingo, same kiel jam eblas ĉe aliaj lingvoj. Imagu alŝuti filmeton al Jutubo kaj ne devi mane tajpi kaj ĝustigi la tempon de la subtekstoj (ege temporabe). Tio baldaŭ estos realo ankaŭ pri nia lingvo, dank' al la kuniĝo de du malfermitkodaj projektoj, *Komuna Voĉo de Mozilla*, kaj la ĉifromono *Miriado*.




Figuro 2: Kreskado de la projekto *Komuna Voĉo*. Esperanto nun rangas 7a el ĉiuj lingvoj.

Figuro 3: Emblemo de Miriado

Volontulado ĉe *Komuna Voĉo* estas ege facila. Oni eĉ ne bezonas krei konton. Oni povas komenci en sekundoj ĉi tie.




Figuro 4: Kun kolekto de 90 horoj, la voĉrekonilo ĝuste subtekstigis ≈ 50 % de vortoj. Mozilla eldonas novan version de la rekonilo ĉiujn 6 monatojn.

Por havi vere utilan, funkcieblan voĉrekonilon, necesas atingi 10.000 horojn da voĉreĝistraĵoj. Dum la projekto *Komuna Voĉo* lanĉis antaŭ 2 jaroj, konstateblas ke la kreskado estis tro malrapida. Feliĉe, antaŭ tri monatoj, investantoj de la projekto *Miriado* decidis financi la evoluadon de *Komuna Voĉo* en Esperanto. Nun volontuloj povas esti pagataj, plenuminte ĉi-tiun formularon.

En la Telegram-grupo t.me/miriadejo, oni sinorganizas pri volontulado ĉe *Komuna Voĉo*. Jam estas 129 membroj.

# Sep Metodoj Por Ludi Pli Bonan Ŝakon

*Aatral Arasu, membro de EFNSK, lichess.org @aa-noob*

1 **Havu Planon!**
Lernu havi plurajn planojn aŭ ideojn en via sako por gajni ludon! Estu fleksebla al matĉa situacio!

2 **Komprenu vian kontraŭulon!**
Komprenu la malsamajn ludstilojn de homo en iliaj ludoj! Ĉu vi povas vidi ilian ŝakkarakteron?

3 **Analizu por gajni!**
Analizu viajn erarojn kaj viajn kontraŭulojn post ĉiu matĉo!

4 **Praktiku por koherecо!**
Praktiku ludadon por lerni kaj evitu ripeti la samajn erarojn! Konservu libraron aŭ kontrolliston por spuri vian kreskon!

5 **Ĝuu la ludon!**
Ĝuu ludi la ludon kaj konsciu pri viaj intencoj kaj la intenco de viaj kontraŭuloj!

6 **Analizu vian menson!**
Analizu kiel vi finiĝis perdi aŭ gajni ludon! Kompreni ĉi tion donos al vi eĉ pli novajn sciojn.

7 **Lernu de la Plej Bonaj!**
Observu matĉojn de grandaj majstroj kaj komprenu ĝin! Se vi ankaŭ povas kompreni la movojn en komputilaj ludoj kiel Stockfish aŭ Leela Chess, vi baldaŭ estos majstro.

## 4.1 Konkludo

Vi devas havi fortan intencon venki, vi lernos ĉion alian sufiĉe rapide per ĉi tiu volo. Post kiam vi scias, vi povas gajni matĉojn laŭplaĉe, trankviliĝu, estas pli multe da vivo ol ŝako. Estu humila, ĉiam estas io nova por sperti en la vivo!

# Utilismo — Kion oni devus fari?

*Maria TERANO, membro de EFNSK*

En la lasta numero, mi skribis pri Domaj Merkatoj, [1] kaj argumentis, ke la abstraktaj demandoj malpli gravas ol la efiko. Ekzemple « Ĉu domeco apartenas al homaj rajtoj? »... Kial ni elspezas tempon pri tiu demando, kiam homoj mortas kaj ne havas domojn? Ĉi tiu artikolo temas pri utilismo, la centrigo de la efiko kaj konsekvencoj de politikoj.

Utilismo estas la etika doktrino, kiu rigardas la utilecon kaj profiton, kiel nur (aŭ plej gravan) principon pri valoroj, scio, agadoj aŭ konduto. [2] [3] Jeremy BENTHAM, kiu fondis modernan utilismon, kreis la plej grandan feliĉecan principon. Kiel oni scius, ĉu io estas justa aŭ maljusta? Esence la fundamenta principo determinas, ke io estas justa, se tio produktas la plej grandan feliĉecon agregatan por la plej granda kvanto de sentemaj estaĵoj, ene de racio. [4] John Stuart MILL ankaŭ ege influis Utilismon, kaj esence kreas Klasikan Liberalismon.

Por klarigi la filozofion imagu: Se oni havas decidon kaj devas elekti inter du alternativoj, kaj unu alternativo kaŭzas pli da damaĝo ol la alia, tiam oni devus elekti la alternativon, kiu kaŭzas malpli da damaĝo. Utilismo apartenas al « normiga etiko », tial utilismo priskribas, kiajn agojn oni devus fari.

Kritikoj kontraŭ utilismo ekzistas. Kiel oni difinas feliĉecon? La manko de doloro? Drogo-dependantoj feliĉas dum iom da tempo. Feliĉeco estas subjektiva, ĉu ekzistas objektiva vidpunkto por mezuri feliĉon? Kiel oni eĉ povas mezuri feliĉecon? Per feliĉecaj unuoj kaj ia feliĉilo? Kaj estas diversaj tipoj de feliĉeco kaj plezuro, ĉu ĉiu tipo valoras egale, kaj kiu taksas tion? Pri kio, se ia ago kaŭzus, ke malplimulto da individuoj ege feliĉiĝus, kaj plimulto da individuoj ete malfeliĉiĝus? Kiel utilismo apartigas devajn kaj superdevajn agojn? Ekzemple « Estus pli bone, se oni donacas la organojn post morto... tamen ne estas devo. Savado de infanoj farendas, sed donacado nur farindas. »

Multe da aferoj estas debatindaj, se la diferenco de feliĉeco estas malgranda. Tamen se la diferenco inter la alternativoj estas granda, utilisto povas facile nomi alternativon kiel pli justan. Ankaŭ estas multe da skoloj de utilismo. Ekzemple kelkaj utilistoj uzas la averaĝon anstataŭ la tuton da feliĉeco. Kelkaj utilistoj uzas kritan limon, tial ili ne murdus ulon por savi kvin aliajn, tamen murdus por savi kvin milonojn. La murdo de Hitlero ja kontraŭas la aŭtonomecon de Hitlero.

Negativa Utilismo pli fokusas la suferon kaŭzatan de malbonaj agoj anstataŭ la feliĉecon de bonaj agoj. Kaj subtenantoj ofte estas kontraŭnaskistoj (homoj devus ne plu naskiĝi!). Preferismo (Prefera Utilismo) temas pri personaj preferoj anstataŭ malbonaj agoj. Aga Utilismo temas pri la realaj konsekvencoj, « Ne spektu televidilon tuttage, se vi povas plibonigi la mondon » Aliaflanke Regula Utilismo asertas, ke justaj agoj konformas al morala regulo, kiu ĝenerale kreas feliĉecon. Utilismo proksimumas al Hedonismo, kiu temas pri la pligrandiĝo de plezuro (Hedonismo mem ne egalas al egoismo).

Estas multe da skoloj, kaj malkonsento ekzistas en teoriaj ekzemploj. Tamen praktike ni ne faras tiajn decidojn ofte, tial utilismo estas bona pensmaniero en la ĉiutago. Espereble ĉi tiu artikolo sufiĉe esploris la ideologion. Nu, venontfoje vi havos decidon, elektu tion, kio kreas pli da utileco!

# Citaĵoj

[1] Maria TERANO. “Domaj Merkatoj”. In: *Telopeo* 57.2 (Marto 2021). http://esperantohouse.org.au/eo/news/telopeo/.


[2] ReVo (Reta Vortaro). *Utilismo*. https://vortaro.net/#utilismo_kd. Vidite merkrede je la dek-sesa de junio 2021.

[3] PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020). *Utilismo*. https://reta-vortaro.de/revo/art/util.html#util.0ismo. Vidite merkrede je la dek-sesa de junio 2021.

[4] Vikipedio. *Utilismo*. https://eo.wikipedia.org/wiki/Utilismo. Vidite merkrede je la dek-sesa de junio 2021.

# Matematikisto Pensas Pri Dio

*Christopher COOPER, tradukita kaj enkondukita de Jonathan COOPER, kasisto de EFNSK*




Mia pli maljuna frato Christopher antaŭ nelonge verkis libron, “The God Theorem: God seen through the eyes of a mathematician” (La Dio-Teoremo: Dio vidata per la okuloj de matematikisto), en kiu li eksplikas sian mondvidon kaj spiritan fidon, kaj diskutas iujn tiklajn demandojn pri la vivo, filozofio kaj moralo. Ĉar li estas matematikisto, lia aliro estas per sistemo de logiko. Kaj fundamenta koncepto de logiko kaj matematiko estas tio de aksiomoj.

Aksiomo estas aserto ne pruvebla, sed konsiderata kiel vera, por servi kiel premiso aŭ deirpunkto por pliaj rezonado kaj pruvoj. Multajn oni rigardas kiel memkompreneblajn (ekz-e, « se a=b kaj b=c tiam a=c ») sed ili ne devas esti.

La teksto, kiu sekvas, estas mia traduko de (redaktita versio de) ĉapitro 3: « Mia Kredo ».

> Mi traserĉis en mia menso, eble eĉ en mia koro, la fundamentajn aksiomojn, sur kiuj mi bazas mian mondovidon. Jen ili:
>
> **Aksiomo 1:** Mi ekzistas.
>
> « Mi pensas, do mi ekzistas », skribis René DESCARTES , La brakoj kaj kruroj: kiujn mi vidas; kaj kiujn mi sentas, kiam ili estas tuŝitaj; eble ne vere ekzistas. Mi povus esti tute « menso ». Sed estas klare, ke mi ekzistas.
>
> **Aksiomo 2:** La ekstera mondo ekzistas.
>
> Ĉu eble, ke la ekstera mondo estas nur iluzio? Homoj aŭdas voĉojn, kiuj ne ekzistas, kaj ili vidas viziojn. La fenomeno de fantomaj membroj post amputado estas bone konata. En sonĝoj, mi vidas kaj aŭdas aferojn, kiuj ne ekzistas. Mi foje havis sonĝon, en kiu mi vekiĝis kaj pensis, kun iom da trankvilo, « Dank' al Dio, ke tio estis nur sonĝo ». Poste, iom poste, mi vere vekiĝis — sonĝo ene de sonĝo! Kio okazus se tio, kion mi nun nomas « reala vivo », estas nur sonĝo? Eble kiam mi mortos, mi vere vekiĝos permanente. Tamen la vivo havas pli da senco, se mi akceptas, ke la ekstera mondo efektive ekzistas.

**Aksiomo 3:** Vi ekzistas.

Ne, tio ne estas nur konsekvenco de Aksiomo 2. Mi povas vidi kaj aŭdi vin, kaj eble eĉ tuŝi vin. Per Aksiomo 2, mi konsentas, ke via korpo ekzistas. Sed vi ne estas via korpo. Eble mi estas la sola homo, kiu havas konscion. Eble la cetero de vi estas nur robotoj.

Estas aserto, ofte farita de homoj, kiuj supozeble havas iom da scio pri la cerbo, ke iu komputila aparato kun pli ol iom da komplekseco aŭtomate konsciiĝas. Sed kiel oni povas decidi la veron de tia aserto? Mi eĉ ne povas pruvi, ke vi havas konscion! Do mi devas konsenti ĝin kiel aksiomon.

**Aksiomo 4:** Memoro estas kontinua.

Ni estas tio, kion ni memoras. Imagu se, dum la nokto, iu forviŝis miajn memoraĵojn kaj anstataŭigis ilin per tiuj de iu alia. Mi fariĝus tiu persono. Mi rigardus mian vizaĝon en la spegulo kaj supozus, ke iu faris al mi plastan kirurgion dum mi dormis. Kiu mi vere estus: la persono, kies memoro sidas en mia cerbo; aŭ tiu, en kies cerbo tiuj memoroj nun loĝas, kaj en kies korpo sidas mia cerbo?

Kiel plej multaj el vi, mi kredas, ke miaj memoraĵoj estas sufiĉe ĝustaj. Mi povas akcepti kelkajn okazojn, kiam mi mismemoris iujn aferojn, sed mi estas tiu, kiun mi memoras esti.

**Aksiomo 5:** Logiko validas.

Mi akceptas norman logikon, per kiu aferoj estas aŭ VERA aŭ FALSA, logikon kun ‹ KAJ ›, ‹ AŬ ›, ‹ SE ›, ‹ TIAM ›, kaj ‹ NE ›. Almenaŭ mi akceptas ĝin, kondiĉe ke mi ne provas uzi memreferencajn asertojn kiel « ĈI TIU FRAZO ESTAS FALSA ».

Iuj logikistoj defiis tiun norman logikon kaj elpensis alternativajn versiojn. Tamen mi rimarkis, ke kiam ili skribas pri siaj alternativaj logikoj, kaj en sia ordinara vivo, ili sekvas norman logikon.

Plej multaj homoj akceptas norman logikon subkonscie. Ili diras: « Vi certe ne lasis la ŝlosilon sur la tablo ĉar ĝi ne estas tie nun », sed ne rimarkas, ke ili uzis la formon de rezonado konata kiel « pruvo per kontraŭdiro ».

**Aksiomo 6:** Estas io preter la materia universo.

Ĉi tie vi eble komencos malkonsenti kun mi. Same kiel ĉiuj supraj aksiomoj, mi ne povas pruvi ĝin. Tial mi nomas ĝin aksiomo. Materiistoj neas tiun aksiomon. Ili argumentas, ke ĉiu penso estas nur produkto de biokemiaj procezoj en la cerbo. « Amo » estas nur la biologia devo generi, kiu pelas evolucion. Kaj tiel plu.

Certe mi akceptas multon, kion ili diras. La devo generi certe estas grava faktoro por enamiĝi. Ĉu ĝi ankoraŭ klarigas la memdediĉon de geedzaj paroj en iliaj maljunaj jaroj, mi ne estas tiel certa.

La problemo pri la doktrino de la materiisto estas la konstato, ke iliaj kredindaj argumentoj estas nur produktoj de biokemiaj procezoj okazantaj en iliaj cerboj. Eble ili estas materiistoj nur pro sia genetiko?

**Aksiomo 7:** Ni ĉiuj havas liberan volon.

Mi intencis diri: « Mi havas liberan volon », sed sekve de Aksiomo 3, mi pretas fari ĝin pli ĝenerala. Mi estas la centro de la universo, sed ankaŭ vi estas.

Mi estas la unua, kiu agnoskas, ke tiu libera volo havas limojn. Mi ne estas tute libera, kaj ankaŭ vi ne estas. Eksteraj cirkonstancoj metas limojn al tiuj, kiujn ni povas elekti fari.

Do, kun tiuj kvalifikoj, mi kredas tiun aksiomon. Tio metas grandan respondecon sur min. Ĉu mi faros la ĝustajn elektojn? Mi devas povi antaŭvidi la konsekvencojn de miaj elektoj. Estus tiom pli facile, se oni ne respondecus pri siaj agoj. Se mi farus krimon — nu, mi estis programita fari tion. Mia moralo estus tre simpla — nur prizorgu min mem, ĉar mia elekto fari tion devas esti antaŭdirektita.

**Aksiomo 8:** Dio ekzistas.

La «io», kiu kreis la universon, iel estas estaĵo, persono, kapabla ami siajn estaĵojn kaj interagi kun ili. Tio estas la plej granda fido de ĉiuj. Kiel ĉiuj antaŭaj kredoj, mi ne povas pruvi ĝin. Sed nek oni povas malkonfirmi ĝin. Ĝi estas aksiomo.

Mi nur povas diri, ke kredo je persona dio estas la fundamento por mondrigardo, kiu por mi havas sencon. Tial ni akceptas aksiomon. Ĝi helpas nin sencigi aferojn. Kompreneble ni ne akceptus iun kredon, kiun ni povas malpruvi, nur ĉar ĝi helpas nin doni sencon al la mondo. Sed se temas pri io nedecidebla – kiam ni devas elekti inter du alternativoj, kiujn ambaŭ ni ne povas pruvi - tiam la pli oportuna estu tiu, kiun ni elektas. Jen kion ni faras en matematiko, kial ne en la vivo?

Praaj homoj ĉiam kredis je ia dio aŭ dioj por eksplikì aferojn, kiujn ili ne komprenis, ekzemple fulmon. Sed nun, kiam scienco povas eksplikì tiajn aferojn, ni povas malhavi tiajn diojn kiel klarigon. Sed ĉar la amplekso de la neklarigeblaj malgrandiĝis, estas tente kredi, ke iam tio tute malaperos kaj ke scienco eksplikos ĉion.

Ke racia pensado povas eksplikì la eksteran mondon ne surprizas. Ke racia pensado povas eksplikì grandan parton da niaj internaj vivoj same ne mirigas. Ke racia pensado povas eksplikì la plej profundajn misterojn de racia pensado mem, ŝajnas esti tro multe cirkla argumento, por ke mi akceptu. Iu ajn edukita en matematika mondo scias, ke memreferenco kondukas al problemoj.

Do tio estas mia elekto. Vi rajtas malakcepti tiun aksiomon, se tio helpas vin kompreni la mondon. Kredo je dio ne rilatas al intelekta kapablo. Estis grandaj pensuloj, kiuj estis ateistoj. Sed estis ankaŭ multaj grandaj pensuloj, kiuj kredis je Dio.

Nun mi bedaŭras diri, ke la kvalito de ateistoj malboniĝis dum la lastaj jardekoj. Grandaj pensuloj, kiel Friedrich NIETZCHE kaj Bertrand RUSSELL, povus starigi grandajn argumentojn, kiuj subtenis ateismon. Tamen multaj el la nuntempaj ateistoj uzis la taktikojn de nuntempaj politikistoj: ĵeti koton kaj uzi sloganojn.

**Aksiomo 9:** Kristanismo provizas fidindan kadron, per kiu koni Dion.

Kial ne judismo aŭ islamo? Kial ne budhismo? Mi supozas, ke la ĉefa kialo estas, ke mi elkreskis en kristana medio. Kristanismo montriĝis por mi tre kontentiga teismo, do ŝajnis esti neniu kialo iri aliloken.

Mi malakceptas la ideon, ke oni faru studon pri ĉiuj ĉefaj mondaj religioj por trovi la plej bonan. Mi ne sekvis tiun principon, kiam mi elektis edzinon. Mi amas ŝin multe kaj ŝi estas ĉio, kion mi volus en edzino. Tamen prudenteco sugestas, ke ie mi eble trovus edzinon iomete pli taŭgan por mi. Sed la vivo estas mallonga. La viro, kiu pasigas sian tutan vivon rendevuante, por trovi la plej taŭgan edzinon, restos sola dum sia tuta vivo.

Se mi trovus min kreskanta el kristanismo, mi certe irus serĉi aliloke. Tamen mi kreskis al kristanismo kaj, dum tempo pasas, ĝi fariĝis pli kontentiga medio por ĉiuj miaj spiritaj bezonoj. Se mi estus naskita en juda aŭ islama familio, mi eble restus en unu el tiuj kredoj.

Tio ne signifas, ke ĉiuj religioj estas egalaj. Kiel kristano mi kredas, ke per Kristo mi ricevas pli klaran bildon pri dio ol se mi estus juda aŭ islama. Sed eble se mi estus iu el tiuj, mi povus pensi same pri tiuj religioj.

> Kion diri pri la vera religio? Ili ĉiuj pli-malpli veras. Ili vere ne kontraŭdiras unu la alian en iuj ajn el la fundamentoj. Ĉiuj tri «religioj de la libro» (judismo, kristanismo kaj islamo) antaŭenigas amon al onia proksimulo, kaj plej multaj praktikantoj de ĉiuj tri religioj ŝajnas serioze provi konduki bonan vivon. Mi akceptas homojn de ĉiuj tri kiel kunvojaĝantoj. Estas nur persona elekto por mi resti kun kristanismo.

Por elŝuti tiun libron, kaj aliajn de Christopher COOPER, iru al coopers-books.net.

Esperanto House
143 Lawson Street
REDFERN NSW 2016
AUSTRALIA

**EFNSK**

La estrarkunsido per reto
La unua dimanĉo de la monata je 11:00
Kontaktu per nsw@esperanto.org.au

**Sidneja Esperanto-Klubo**

Ĉe la esperanto-domo 143 Lawson St REDFERN NSW 2016
Ĉiun sabaton je 18:00
Kontaktu per 02 9319 4775

**Manlia Esperanto-Klubo**

Ĉe Whitewater Restaurant 36 S Steyne MANLY 2095
La unuaj kaj triaj sabatoj de la monato je 10:30
Kontaktu Roger SPRINGER per 02 9976 6320 aŭ manly@esperanto.org.au

**Esperanto-Kluboj de la Centra Marbordo kaj Novkastelo**

Ĉe Wyong Milk Factory Cafe 141 Alison Rd WYONG NSW 2259
La tria dimanĉo de la monato je 12:00
Kontaktu Joanne CHO per 0413 087 340 aŭ centralcoast@esperanto.org.au

**Esperanto-Klaso de Cooma**

Ĉe Snowy Mountains U3A Shop 8 (supre) Centennial Plaza
81-97 Commissioner St COOMA NSW 2630
Ĉiun ĵaŭdon je 15:00
Kontaktu Penny VOS per 0429 170 739 aŭ penivos@yahoo.com

**Esperanta Kafo-Klubo de Kanbero**

Ĉe The Pancake Parlour 122 Alinga St CANBERRA ACT 2601
Ĉiun jaŭdon je 17:00
Kontaktu Huigh MALCOLM per 02 6288 4334 aŭ canberra@esperanto.org.au

www.esperantohouse.org.au
www.instagram.com/esperanto_nsw
www.facebook.com/EsperantoNSW
www.meetup.com/esperanto-in-Sydney

| | |
|---|---|
| **Prezidanto** | Andrew SPANNENBERG |
| **Vicprezidanto** | Dmitry LUŜNIKOV |
| **Sekretario** | Nicole ELSE |
| **Kasisto** | Jonathan COOPER |
| **Estraranoj** | Alan TURVEY, Adam LEVY |